

---

**BOLLETTINO D'INFORMAZIONE AI SOCI**

---

**SOMMARIO**

- I nostri prossimi venerdì
- 72° Congresso Nazionale d'esperanto a Treviso
- Bilbao invitas al la 6a Eeu-kongreso
- 17 Katolika printempa kunveno en Brescia
- Internacia semajno "Invito Al Tibeto"
- Se oni volas iri al Ĉinio Okcidente...
- Invito al seminario en Slovenio
- Esperanto kaj Linux
- Esperanto kristnaske en Placo Sankta Petro
- Estrarkunsido
- Conferenza a Genova dell' Ing. Bonvecchiato
- Prelego de s-ano Montagner pri Esperanto
- In crescita l'esperanto a Radio Pechino
- Alvenis anonco pri "Projekto Tv"
- Niaj pasintaj vendredoj
- Nia vespermanĝo de amikeco
- "Turismo per Esperanto" informa
- Klaĉangulo
- Notizie dal mondo

**Circolo Esperantista Milanese**

Via De Predis 9 - 20155 Milano - tel. 347-4262214 *(solo venerdì sera)*

*e-mail:* [esperantomi@infinito.it](mailto:esperantomi@infinito.it)

*rete:* <http://www.infinito.it/utenti/esperantomi/>

C.C.P. 26448209

## **I NOSTRI PROSSIMI VENERDÌ**

**ore 21,15**

*aperti a tutti gli interessati: soci e non soci*

**Venerdì 5 marzo**

### **RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

**Venerdì 12 marzo**

La serata, che inizia con la tradizionale pizza (prenotarsi in sede o da Rodari, tel. 02.2364190), prevede un ospite d'eccezione: dal Brasile arriva il s-ano Flavio Rebelo, che sta compiendo un lungo giro attraverso l'Europa per presentare il

### **PROGETTO ITV**

ampiamente illustrato in altro articolo del bollettino. Egli presenterà pure un breve DVD sul tema, che vedremo sul grande video donato dal s-ano Ceffali.

**Venerdì 19 marzo**

### **TRAFOLIUMANTE LA ESPERANTAN GAZETARON**

**Venerdì 26 marzo**

### **LA TRADUKA RONDO**

**Venerdì 2 aprile**

Come da regolare e documentata convocazione si invitano i soci alla

### **ANNUALE ASSEMBLEA DEL C.E.M.**

**Venerdì 9 aprile**

**La SEDE rimane CHIUSA. Buona Pasqua a tutti!**

**Venerdì 16 aprile**

Oni ludas per

### **KRUCVORTOJ**

**Venerdì 23 aprile**

Preceduto dal conviviale incontro in pizzeria (prenotarsi come sopra già indicato) il programma prevede il gradito ritorno fra noi del s-ano d-ro *Roberto Tresoldi* con una interessante conferenza su:

## **JAPANIO EN LA XIX JARCENTO**

L'apertura delle frontiere del Giappone nelle memorie de  
primi viaggiatori europei.

**Venerdì 30 aprile**

Revenas

## **MOZAIKO**

**Venerdì 7 maggio**

### **RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

come sempre aperta a tutti

## **72° CONGRESSO NAZIONALE D'ESPERANTO A TREVISO**

Questa stupenda città, famosa per i suoi palazzi monumentali ed i canali fluviali e che tra le sue imponenti mura raccoglie secoli di storia e di arte, è un motivo in più per partecipare al nostro congresso, che i samideani locali stanno allestendo con il massimo impegno per renderlo accogliente, interessante ed efficiente. Una nutrita partecipazione sarebbe il doveroso riconoscimento al loro lavoro. Si raccomanda di iscriversi tempestivamente, non solo per non pagare poi quote maggiorate ma specialmente per favorire il lavoro organizzativo. Le quote, qui già annunciate, e le varie possibilità alberghiere sono pubblicate in dettaglio rispettivamente sui n° 7 ed 8 della rivista. Ecco invece in sintesi il programma, anche se potrà subire qualche variazione:

**Venerdì 3 settembre**

Pomeriggio: arrivo dei congressisti e loro sistemazione

Ore 17-19: Corso di esperanto

“ 21-23: Coro ed “Urbokona Vespero”

**Sabato 4 settembre**

Ore 9-11: Inaugurazione

“ 11-13: 1° Conferenza

“ 15-19: Escursione a Stra ed alla famosa villa.

“ 17-19: Corso di esperanto

“ 21-23: Banchetto, oppure, in alternativa, una passeggiata in città

**Domenica 5 settembre**

Ore 9-11: 2° Conferenza

- “ 9-11: Corso di esperanto
- “ 11.30: Santa Messa
- “ 15-19: Assemblea della FEI
- “ 21-23: Serata teatrale

### **Lunedì 6 settembre**

Ore 9-11: 3° Conferenza

- “ 9-11: Corso di esperanto
- “ 11-13: Gruppo di lavoro del Kirek
- “ 15- 19: Escursione in Treviso
- “ 15-17: Convegno Istituto Ital. Esper. e di altre associazioni
- “ 17-19: Convegno I.L.E.I.
- “ 20.30-21: Chiusura del Congresso
- “ 21-23: Concerto

### **Martedì 7 settembre**

Giornata d'escursione a Maser, Asolo, Possagno, Fanzolo e loro ville

### **Mercoledì 8 settembre**

Giornata d'escursione a Venezia. Possibilità di scelta fra città e isole

**Note:** tutti i pranzi sono dalle 13 alle 14 e le cene dalle 19 alle 20.30  
I temi delle tre conferenze non sono ancora noti.

## **BILBAO INVITAS AL LA 6a EEU-KONGRESO de la 25a ĝis la 29a de aŭgusto 2004**

Ĉi-jare la Universala Kongreso okazos en Ĉinio: por tiuj kiuj ne emas vojaĝi tiel malproksimen bona alternativo por esperantumi en internacia etoso estas la Eŭropa E-Kongreso en Bilbao (Vaskio en Hispanio). Vi ne bezonos ŝanĝi valuton: vi restos en Eŭro-lando.

Jen la aliĝkotizoj (en eŭroj) por Italoj kaj ceteraj EEU-anoj:

*ĝis 30-04-2004      poste*

Kat. 1 Individua kongresano	60	70
-----------------------------	----	----

Kat. 2 Kunulo (tiu, kiu loĝas samadrese	40	45
---	----	----

kun aliĝinto, kiu pagas kotizon en 1)

aŭ Junulo (tiu, kiu naskiĝis post 31-12-74)

La koncernan kotizon vi povas pagi pere de IEF, kune kun la aliĝilo.

Bilbao estas la ĉefa urbo de la hispana aŭtonoma regiono nomita Vaskio aŭ Euskio. Ĝia ekzisto kaj historio dependas de tri geografiaj faktoj: montareco, riveroj kaj maro. Tiel, ĝi situas en profundaĵo de la

valo formita de la rivero Nerviono, tute ĉirkaŭata de montoj. La nuna urbo estas la fina rezulto de sinsekvaj aneksoj de proksimaj komunumoj. Malgraŭ ke la nuna Magistrato respondecas nur pri 400.000 loĝantoj, eblas tamen paroli pri pli granda urbo, la tiel nomata "Granda Bilbao", kun ĉirkaŭ unu miliono da personoj, kiuj amasiĝas en urbetoj laŭlonge de la rivero kun malsamaj aspektoj.

Klimato: Ĝi estas milda dum la tuta jaro: malofte frostas aŭ neĝas dum vintro kaj tre malofte estas pli ol 30 gradoj dum somero; la vetero estas ege ŝanĝiĝema dum la tuta jaro, simile al tiu de okcidenta Francio aŭ suda Anglio.

La "nova" Bilbao. Ĝis la 90aj jaroj, Bilbao estis tipa industria urbo, kun du ĉefaj agadkampoj: siderurgio kaj ŝipkonstruado. Post la forta ekonomia krizo de la 70aj jaroj, kiu mondscale skuis diversajn landojn kaj speciale forte batis la industriajn regionojn, Bilbao alfrontis radikalan transformiĝon, kies plej videblaj fruktoj estas la muzeo Guggenheirn, la metroo kaj la redono de ambaŭ flankoj de la rivero, kie antaŭe etendiĝis diversaj fabrikoj, al la loĝantoj.

E-movado: En Bilbao troviĝas unu el la plej malnovaj E-grupoj de la mondo: ĝi estis fondita en la jaro 1906. Bedaŭrinde, post la hispana intercivitana milito (1936/39) kaj alveno de diktaturo, ĝi malaperis pro malpermeso de Esperanto en la tuta lando. Tamen, transpasinte multajn barojn, ĝi sukcesis renaskiĝi en la jaro 1953. Ekde 1957, ĝia sidejo troviĝas en la malnova kvartalo de Bilbao, en la strato Barrencalle Barrena, 7. Menciinda estas la fakto ke en la urbo ekzistas strato kun la nomo "Esperanto".

Tiu ĉi estas urbo en konstanta transformiĝo, kun gastamaj homoj, kiuj optimisme rigardas al la estonteco, sed estas forte enradikiĝintaj en siaj tradicioj; kun tre riĉa historio rilate la E-movadon, en loko kie eblas surhaŭte senti la problemojn kaj la riĉecon de dulingveco: apud potenca lingvo kiel la hispana, oni parolas ankaŭ la vaskan (aŭ "euskeran"), pralingvon de nekonata deveno, nun pluvivanta danke al trafikaj zorgoj. Jen okazo por enkonduki nian kongresan temon:

***"Eŭropa unuigo: Esperanto por multlingva mondo"***

## **17° KATOLIKA PRINTEMPA KUNVENO EN BRESCIA**

Ankaŭ ĉijare niaj milanaj amikoj de la "Katolika Esperanto Centro" organizas la tradician seminarian kunvenon kaj kiel kutime la programo estas tre riĉa kaj grava. Jen ĝi sinteze:

## **Sabaton, la 17 de aprilo**

**h.12.30:** Tagmanĝo kaj poste libervola vido de kasedo pri Brescia

**h.14.30:** Enkonduko al la temaro "La artefaritaj lingvoj" (G.Corrado)

**h.15.40:** Kontribuoj al la temaro fare de Maria Lucchi (La filozofiaj lingvoj), G. Daminelli (Artefaritaj lingvoj en Reto), Norma Covelli (Volapuk), Tiziana de Filippo (Ido), G.Rosada (Peano, Latino sine flexione, Interlingua, Glose), F.Corrado (SolReSol), M.Teresa Lodi (Klingon: la lingvo de Star Trek)

**h.17.15:** Laŭ la vidpunkto de Gianni Conti "Eble ni eraris ĉion"

**h.19.00:** Rozario kaj poste la vespermanĝo

**h.20.45:** Historio de Brescia (Luciana Bianchi). Poste la kompletorio

## **Dimanĉon, la 18an de aprilo**

**h.08.00:** Matenaj preĝoj kaj matenmanĝo

**h.09.00:** Don Guanella (??)

**h.09.30:** I Guanelliani (padre Alfano)

**h.10.00:** Instruoj de don Guanella (mons. Balconi)

**h.11.00:** Sankta Meso

**h.12.30:** Tagmanĝo kaj poste vizito de la urbo aŭ estrarkunsido

La kunvenejo estas ĉe "Centro Mater Divinae Gratiae" - Via S. Emiliano 30 / 25127 Brescia.

## **INTERNACIA SEMAJNO "INVITO AL TIBETO"**

En Nova Sento 356 estas jena informo, kiu jam aperis en NUN kaj kiun oni rekonfirmas sen ia korekto:

Ni invitas vin partopreni "Internacia Semajno OE; Eniro al Tibeto' en 2004". Dum la aktivado, ni eble prezentas al vi kulturojn kaj historiojn de Tibeto kaj per hada-oj sanktaj kaj puraj bonvenigos vin vizitadi mistermontojn kaj sanktlokojn sur firsto de la mondo. En la Internacia Semajno (01-07/08) post la 89-a UK ni prezentos al aliĝantoj 5 itinerojn kaj 11-gradajn prezojn. Organizataj de Xi'an Zhiyuan Kultura Firmao kaj turismaj oficejoj de Xi'an kaj Tibeto.

Informas: Zuo Jun (s-ro), Xi'an, C'inio.

Retadreso: [partnero@pub.xaonline.com](mailto:partnero@pub.xaonline.com)

Se oni ricevos pliajn detalojn pri tiu semajna ekskurso al Tibeto, ŝajne programita de neesperantista organizaĵo kaj eble sen interkonsento kun U.K., ni ilin publikigos.

## SE ONI VOLAS IRI AL ĈINIO OKCIDENTE.....

Karaj geamikoj,

Mi invitas vin partopreni en rara komuna kongreso de ELNA kaj KEA (Usono kaj Kanado). Ĝi okazos de la 16a de julio (vendredo) ĝis la 19a (lundo). La loko estos Sidney, Brita Kolumbio, Kanado, urbeto norde de Viktorio sur la spektakla, belega Vankuvera Insulo. La kongresa loko estas survoje al la UK en Pekino de la posta semajno. Fakte, oni povas ankaŭ partopreni en speciala postkongresa ekskurso sur la insulo kaj en la urbo de Vankuvero, sur la ĉeftero, antaŭ ol flugi al Ĉinio por la universala kongreso.

La TTT-ejo <<http://www.esperanto.org/ELNA/kongreso2004/>> donas multajn detalojn pri la kongreso: kongresejo, loĝejoj, Sidney, aliaj apudaj kaj vizitindaj urboj (Seatlo, Viktorio, Vankuvero), transportado, aliĝo.ktp

Arlyn Kerr [arlynkerr@earthlink.net](mailto:arlynkerr@earthlink.net)

## INVITO AL SEMINARIO EN SLOVENIO

Okaze de samtempaj ĉelimaj celebradoj por festi la aliĝon de la lando al Eŭropa Unio Slovenia Esperanto-Ligo organizas seminarion. Jen informoj ricevitaĵ de s-anino Edvige Tantin:

**Temo:** pligrandigo de Eŭropa Unio

**Dato:** de la 29a de aprilo ĝis la 2a de majo 2004

**Loko:** Gorizia kaj Nova Gorica

**Loĝado:** Junulargastejo.

**Aliĝ-kotizo:** la partopreno en la tuta seminario estas nur € 78 kaj inkluzivas loĝadon, manĝojn kaj la programon.

Partoprenos oficialaj reprezentantoj de esperanto-grupoj el Aŭstrio (8 personoj), Hungario (10 personoj), Friulo-Julvenetio (10 personoj), Kroatio kaj Slovenio. Kompreneble oni esperas pri vasta partopreno kaj ĉiuj estos bonvenaj.

Sed urĝas rezervi la lokojn!!! Anoncu vin al **Triesta Esperanto-Asocio** ĉe la suba ret-adreso: [nored@everyday.com](mailto:nored@everyday.com)

Menciindas ke la itala kaj eŭropa parlamentano Alessandro Maran partoprenos parte en la seminario kaj ke ĉe tiu limo inter Italio kaj Slovenio okazos la plej grandaj aranĝoj por festi la aliĝon de Slovenio. Do, ĉeestos amaso da personoj kiuj venos el ĉiuj partoj. Ni ne nur interkonsiliĝos pere de laborgrupoj, preparos afiŝojn plurlingvajn, ludos, prezentos projektojn pri esperantista kunlaboro, ktp., sed

ankaŭ partoprenos en la oficialaj festoj organizotaj de la lokaj kaj regionaj instancoj. Via partopreno estos tre valora kaj permesos al ni pli efikan informadon pri esperanto kaj nia movado. Anoncu vin kiel eble plej rapide, ĉar Nova Gorica kaj Gorizia ne estas grandaj urboj kaj sekve ankaŭ ilia loĝentempoveco.

## **ESPERANTO KAJ LINUX**

La 24an de februaro, marde vespere, ĉe nia sidejo okazis kunlabora renkontiĝo inter nia klubo kaj reprezentantoj de OpenLabs, kultura asocio kiu prizorgas la disvastigon de la konata Linux, libera kaj senpaga komputora sistemo. Por la rendevuo kun areto de ses ĝiaj kompetentaj kaj vervaj reprezentantoj, kun ilia prezidanto d-ro Fabrizio Picca, ĉeestis milanaj esperantistoj, krom du kiuj laŭcele venis el Trieste kaj Padova, kaj tre malmultaj kvartalaj loĝantoj kiuj sciis pri la invito. Post la komenca prezentado de Linux kaj de ĝiaj celoj kaj karakterizoj, ne okazis la kutima prelego sed precipe sinsekvo da informoj kaj klarigoj, da demandoj kaj respondoj kiuj ebligis pli bone koni la teknikajn ecojn de la sistemo kaj la solvojn de pluraj personaj problemoj aŭ duboj pri ĝi. Danke al porteblaj komputoroj la gastoj montris plurajn ekzemplojn de utiligado de programoj kaj kompatibileco kun aliaj sistemoj. Komprenoble ne mankis vigla interparolado pri la nemankeblaj “esperantaj ĉapeligitaj literoj”. Fine ili tre ĝentile donacis al ĉiuj petantoj disketon kun la instaliga programo de Linuksa sistemo, laŭ la esperantlingva versio.

## **ESPERANTO KRISTNASKE EN PLACO SANKTA PETRO**

Kelkaj miris, kelkaj protestis: kial ĝuste la antaŭa bulteno de la milana klubo ne informis pri la plensukcesa ekspedicio al Romo, okaze de la papa beno, de la taĉmento organizita de nia milana Gianni Conti, dum la aliaj retaj kaj paperaj informiloj abunde anoncis ĝin? Ĉu pravas la fama latina proverbo “neniu estas profeto en sia urbo”? Ne! La klarigo estas pli banala. La oficiala teknika frazo estus: “oni jam estis ekspresiganta ĝin” Por tagĵurnalo tio signifas ke la informo alvenis dum la lasta horo, por revuo dum la lasta nokto, por ni dum la ...lasta semajno. La 22an de decembro la tiel dirita redakcia stabo, antaŭ sia foriro el Milano por la kristnaskaj libertempoj, fermis la bultenon kaj ĝin sendis al la enpaĝigisto kun la rekomendo havigi poste la tuton al nia “tipografo” ĝustatempe por permesi al li ĝin fotokopii antaŭ la



januaraj kunmetado kaj sendado. Programado vera laŭ ni, limakemema laŭ aliaj. Tamen oni ne povis raporti pri estonta okazaĵo. Nun niaj legantoj jam scias ĉion pri ĝi kaj pluraj ankaŭ vidis televide la grandan vorton “Esperanto” alten danci kiam la Papo benis esperantlingve. Tiu ĉi bulteno povas nur konfirmi ke la milanaj klubanoj, fieraj havi inter si tiel kapablan kaj inventeman agemulon, ĝojas pro la sukceso de tiu iniciato, kiel kutime, kaj lin gratulas.

## **ESTRARKUNSIDO**

Ĝi malfermis la novjaran agadon la 9an de januaro. Nia prezidanto Polerani konfirmis ke li jam petis al Kvartala Konsilio ke nia klubo estu registrata en la listo de la kvartalaj asocioj kaj ke preskaŭ certe tion oni akiros. Li konstatis ankaŭ ke ĉe ĝia sidejo estas grandaj ejoj disponeblaj por tiuj asocioj, kiam ili intencas aranĝi iniciatojn. Por ni estus interese organizi publikan prelegon kun debato por konatigi nin. Pli bone kaj alloge se la inform-agado pri ĝi prizorgu la Kvartala Estraro, per propraj afiŝoj. La plej taŭgaj monatoj estus la printempaj aŭ la aŭtunaj, D-ro Polerani kontrolos tiun ĉi eblecon. D-ro Foà diris ke ankoraŭ nenion oni scias pri la programo de la frankfurtaj s-anoj por celebri la centjariĝon de ilia klubo. Eble ĝi ne estas ancorŭ fiksita sed oni esperas ke tio oficiale okazu maksimume dum la venonta aprilo por ĝui la gravajn rabatojn kiujn la flugkompanioj donas al la fruaj mendantoj. Oni aprobis la reaperigon de nia kluba anonco por la nuna jaro en Jarlibro, kaj la organizon de kunveno de Linux, iun mardon ĉe nia klubo, por informi pri ĝi kaj donaci la instaligon de la esperanta programo al eventualaj interesotoj. La tuton aranĝos S.ro Castelli kunlabore kun nia Gianni Conti. Oni sciigis ke daŭras la taŭgigo de la malnova komputero por poste ĝin utiligi por la katalogado de la kluba biblioteko kaj ke finfine la interretaj kluba kaj komunuma lokoj estas ĝisdatigitaj kaj bone funkciantaj, danke al la respondeculoj. Fine d-ro Polerani sugestis kolekti la fakajn vortojn kiujn oni trovas per niaj vendredaj programoj “Riĉigu vian vortaron”: li estas preta memori ilin per komputero.

*E. R.*

## **CONFERENZA A GENOVA DELL' ING. BONVECCHIATO**

Nel salone della “Società Ligure di Storia Patria”, nel prestigioso Palazzo Ducale di Genova, il nostro socio Gustavo Bonvecchiato ha tenuto una conferenza intitolata “Esperanto: una tutela per le lingue

nazionali e le parlate locali”. All'inizio egli ha esposto il problema delle lingue, la sua importanza per l'Unione Europea e per il mondo intero, i notevolissimi costi e gli inconvenienti della situazione attuale e la complessità delle scelte fra possibili soluzioni, quali, ad esempio, plurilinguismo, monolinguisimo, uso di calcolatori per le traduzioni. È stato evidenziato come una lingua neutrale possa servire da ponte e ridurre le dimensioni degli enormi programmi di calcolo necessari alle traduzioni ed evitare imperialismi linguistici, glottofagie ed etnolisi. Il nostro socio ha descritto anche la struttura dell'esperanto, la sua ricchezza di vocaboli, la vastità della sua letteratura l'esistenza in Italia delle biblioteche di Massa e dell'Istituto Universitario di Lingue Moderne di Milano, il suo riconoscimento come lingua letteraria da parte del PEN Club. In chiusura è stato fatto notare come l'esperanto, evitando la glottofagia di una lingua nazionale dominante, possa salvaguardare le lingue delle piccole nazioni e le parlate locali. Hanno seguito l'esposizione una cinquantina di persone, quasi tutte socie del circolo culturale “A Compagna”. Estesa traccia dell'esposizione è disponibile presso il CEM, per facilitare chi desiderasse seguire questo esempio presso altri circoli culturali.

*G. Bonvecchiato*

### **PRELEGO DE S-ANO MONTAGNER PRI ESPERANTO**

Dimanĉe matene la 8an de februaro pluraj niaj klubanoj ĉeestis la prelegon kiun nia s-ano Andrea Montagner zorgis ĉe kultura klubo “Erbavoglio” en Milano. La preleganto prezentis la internacian lingvon laŭ pluraj aspektoj, teknikaj kaj sociaj. Li bone klarigis ĝiajn originajn kialojn, historion, evoluigon kaj enhavajn idealojn. Poste estis pritraktataj ĝiaj racia gramatika strukturo kaj neŝanĝebleco, vortara riĉiĝo, vasta literaturo, utiligo en la plej diversaj kampoj de la homa vivo kaj monda organiza reto, de UEA ĝis la multnombraj fakaj asocioj. Lin helpis kompletigi la panoramon la direktoro de Itala Instituto de Esperanto, s-ano Carlo Bourlot kiu plurfoje intervenis por verve aldoni precizigojn kaj kromajn informojn.

### **IN CRESCITA L'ESPERANTO A RADIO PECHINO**

La durata delle trasmissioni in esperanto di Ĉina Radio Internacia è stata portata ad un'ora, dalle 19.30 alle 20.30 (ora UTC) sulla

lunghezza d'onda di metri 30,86 e 41,29 pari a kHz 9720 e 7265.  
Diversi gli argomenti trattati e le rubriche, oltre ai vari notiziari.  
Gradite le opinioni degli ascoltatori.  
Ĉina Radio Internacia - Poŝtkesto 4216 - Pekino - Ĉinio 10004  
espradio@cri.com.cn <http://esperanto.cri.com.cn>

### **ALVENIS ANONCO PRI "PROJEKTO TV"**

Jen nova etapo en la historio de nia lingvo: venis la tempo por ITV, la Internacia Televido. Kun la financa helpo de la esperantistaro, la profesia teamo de Ĝangalo baldaŭ lanĉos la unuan televidkanalon interretan tute en Esperanto. Ĝiaj programoj estos nepre profesiaj, bonege faritaj kaj filmitaj, tiel ke estos plezuro akompani seriojn aŭ ĉapitrojn de romano entelevidigitaj de ITV. Ĉiutage la noticoj de la mondo vin trafos per la televida ĵurnalo de ITV, kiu, kun Ĝangalo, montros al vi la mondon laŭ esperantista vidpunkto. Programo por komencantoj ankaŭ estas ekde la komenco de la elsendado en niaj planoj. Speciala programo pri kluboj, asocioj kaj ligoj de Esperanto tra la mondo, same kiel televidaj intervjuoj kun niaj kantistoj, politikistoj kaj literaturistoj estos ordinaraj programeroj ĉiutagaj.

Por la ekfunkciigo de ĉi tiu mirinda interreta televidkanalo, la administracio de la Projekto ITV bezonas la apogon de ĉiuj esperantistoj. Post akurataj kalkuloj, la teamo de Ĝangalo konkludis, ke ja eblas lanĉi propran televidkanalon interretan, kun varia programaro, elsendanta 24 horojn tage, 7 tagojn semajne, kontraŭ 35.000 eŭroj. Ŝajnas multe, sed oni memoru, ke nur UEA havas pli ol 5 mil membrojn, krom SAT, k.t.p.

Oni povas aserti eksterdube, ke la kapitalo necesa por ITV estas (kaj estos) atingebla. Ekz. sufiĉus ke 350 homoj donacu 100 eŭrojn. La administracio de la Projekto ITV certas, ke estas nur afero de tempo.... kaj la tempo povas grandparte iĝi pli mallonga, se ankaŭ vi kontribuos! Ĝiru sumon egalan aŭ superan al la minimuma kontribuo (25 eŭroj) en la UEA-konto de Ĝangalo (GXAN-V), aŭ demandu por scii pri aliaj manieroj mone kontribui.

Helpu nin revolucii Esperanton per la establo de la unua interreta televidkanalo tute en la internacia lingvo. Ĉio dependas de la partopreno de la esperantistoj de la tuta mondo.

Por pliaj informoj pri la Projekto ITV, sendu mesaĝon kun viaj duboj, sugestoj, ideoj kaj kontribuoj al [televido@gxangalo.com](mailto:televido@gxangalo.com).

Flavio Rebelo - Ĉefadministranto Projekto ITV  
fonto: ret-info - <http://www.eventoj.hu>

## **NIAJ PASINTAJ VENDREDOJ**

Nekutima programo malfermis la novan jaron de la vendredaj prelegoj. Ĝi estis zorgita de nia prof-ino *Serenella Giacchino* kun la helpo de s-ino *Maria Luisa Faiella*, kiu legis itallingve la unuopajn aforismojn antaŭ ilia traduko. Jes, ĉar la temo estis la aforismoj de ŝia patro Ignazio Giacchino, iame klera entreprenisto. Li emis kondensi per mallongaj maksimumoj sian penson kaj siajn sagacajn rimarkojn kaj konkludojn pri la ĉirkaŭstaranta mondo. La filino ilin konservis kaj tiel ŝi povis ankaŭ aranĝi ĉi tiun tre interesan programon ĉe nia klubo. Estis sinsekvo de ellaboritaj konceptoj, de spritaj kaj saĝaj difinoj pri situacioj, kondutoj kaj agmanieroj viditaj pere de la senrevaj kaj atentaj okuloj de flegma kaj eksterrestanta observanto. Kompreneble oni povas nek ilin resumi nek ĉi tie ilin transskribi. Oni nur citas, kiel ekzemplon, kvar el ili, inter la plej koncizaj: -Tribunalo: la labirinto de la vero-/- Fido: la rifuĝo de necerteco-/- Kripo: la postbutiko de Parlamento-/- Dimanĉa ekskurso: streĉita ripozo-.

Tre interesa, kaj imitenda kiel prezentada metodo, vendrede la 13an de februaro, la prelego de *d-ro Taccani*, kiu sukcesis altiri la atenton kaj akiri la komprenon de ĉiuj de la komenco ĝis la fino, enŝovante iom da samtempa traduko, kiam ĝi estis necesa. Laŭte kaj per klara voĉo li, post la listigo de la plej grandaj predikintoj de la pasinteco, devigitaj sin adresi al la popolo per tre kompreneblaj paroloj, prezentis la parabolojn de Budha, aŭ princo Sidarto Gotamo, de la frua 6a jarcento a.K., tre konata pro sia saĝeco. Fakte lia penso estas pli filozofio ol religio. La preleganto legis, kun aldono de klarigoj kaj komentarioj, ses parabolojn de Budha, elektitaj inter pluraj kiujn li konas danke al kolekta libreto aĉetita en Japanujo. Vere taŭgaj por helpi ĉiujn plibonigi sian konduton kaj koni la proprajn limojn.

## **NIA VESPERMANĜO DE AMIKECO**

Proverbo asertas: ĉetoble oni ne maljuniĝas. Fakte la jardekoj pasas sed la tradicia jara bankedo estas ĉiam vigla. Ĉijare preskaŭ kvardeko da amikoj kaj s-anoj ĉeestis jaŭde la 26an de februaro en jam konata urba restoracio por gaje travivi kune vesperon en amikeca etoso. Ankaŭ la abunda kaj bongusta menuo kontribuis al ĝia sukceso.

## "TURISMO PER ESPERANTO" INFORMA

La nota organizzazione turistica del s-ano Foà (Via Casale 7–Milano-tel. 02.58112342 / 02.58111573, preferibilmente tra le ore 17-19 dal lunedì al venerdì) per la prossima primavera ha programmato i seguenti viaggi.

- **Pasqua in Ungheria** in pullman (con ritorno diurno) dall'8 al 12 aprile con quota di € 259.
- **Ponte del 1° maggio nella Foresta Nera** in pullman (con diurni sia l'andata che il ritorno) dal 30 aprile al 2 maggio con quota di € 187. Le quote comprendono i trasporti, le escursioni all'interno dei paesi visitati, il pernottamento in camere doppie con servizi privati e le prime colazioni.

Per il mese di agosto (con partenze intorno al 7 agosto) sono in fase di programmazione viaggi in aereo in Sudafrica, in USA (dal Texas alla Florida), in Messico (da Città del Messico allo Yucatan), in nave e pullman in Tunisia (dal mare al deserto) ed in pullman sulla "Via dell'ambra" (nei Paesi Baltici con San Pietroburgo) e "nell'impero di Carlo Magno" (tra Francia, Germania, Olanda).

## KLAĈANGULO

Oni ne povis kontroli ĉiujn gazetojn aŭ bultenojn, paperajn aŭ retajn, retmesaĝojn aŭ aliajn informilojn. Do, laŭ nekompleta statistiko en placo Sankta Petro, okaze de la kristnaska beno de Papo, ageme partoprenis: 11 anoj de FEI, 5 de UECI, 2 de ILEI, 4 de CEM, 2 de Esperanta Civito, 4 de KEC, 1 de ERA, 1 de IKEK, 1 de IEJ, 1 de TEVA, 1 de IFEA, 2 el Argentino kaj 1 simpatianto. La sumo estas 14 personoj. Ĉu matematiko estas opinio?

.....  
La praveco de tiuj nombroj estos kontrolebla en la jarraportoj pri la agado de tiuj cititaj asocioj.

.....  
Por helpi la solvon de la enigmo oni aldonas ke en la Organiza Komitato de tiu iniciato kvin asocioj havis sian reprezentanton. La nomo de tiu Komitato itallingve estas Gianni Conti.

=====  
En Sennaciulo, oficiala revuo de SAT, tabelo informas ke aliĝo al SAT + abono al revuo kostas 48 eŭrojn, dum la nura abono kostas 52 eŭrojn. Oni povas garantii ke tiuj kotizoj ne estas eraraj. Do, jen nova

taktiko por ruze konvinki la interesiĝantojn aliĝi. Por plialtigi la statistikan nombron de la anoj aŭ ĉar alimaniere oni ne havus ilin?

.....  
La vero ofte estas duvizaĝa. Ĉi-foje ĉu oni temas pri monpuno por tiuj kiuj ne volas aliĝi aŭ pri kaŝita pago por tiuj kiuj pagas la aliĝon?

.....  
Alia konstato: la tabelo sciigas ke la francoj pagas iomete pli: 50 kaj 55 eŭrojn. La itala peranto klarigas ke la tarifoj estas fiksitaj laŭ la pagipova nivelo de la nacioj. Sufiĉis du eŭroj por la grandemulaj francoj por konfirmi sian superecon kompare al la italoj, kiuj povas sin konsoli danke al la triamondemaj hispanoj (32 kaj 36 eŭrojn).

=====  
En Nova Sento n° 356 estas interesaj informoj pri la plej oftaj demandoj pri Esperanto kun la koncernaj respondoj. Sed pri kulturo kiel respondo oni invitas dokumentiĝi je iu paĝo 33. Oni supozas ke tiu kiu kapablos trovi tiun paĝon gajnos senpagan aliĝon al pekina Universala Kongreso.

## **NOTIZIE DAL MONDO**

**Rotterdam** – Da aprile Osmo Buller ritornerà ad essere il Direttore Generale dell'UEA, incarico dal quale si era dimesso, sostituito dallo scrittore Trevor Steele ora dimissionario.

**Strasburgo** – Il 9 maggio qui si svolgerà la già annunciata manifestazione “Europa Bunto” degli esperantisti europei in difesa della democrazia linguistica e dei diritti dei cittadini. Con striscioni, musica, canti ed altre iniziative. Si spera in una forte partecipazione.

[europa.bunto@eraro.com](mailto:europa.bunto@eraro.com) <http://europa.bunto.free.fr>

Coordinatori per l'Italia i s-ani Laura Brazzabeni e Giuseppe Valente.

**Bruxelles** – A seguito della nota iniziativa dell'ERA di dicembre, è già sorto il KEILEU, il comitato per l'introduzione della lingua internazionale nell'E.U., presieduto da Michele Gazzola. Saranno 25 le nazioni rappresentate: per l'Italia delegato il s-ano Giorgio Pagano.

**Treviso** – Agli allievi del corso di esperanto in rete Kirek che entro il mese di agosto termineranno positivamente il corso viene offerta la gratuita iscrizione al 72° Congresso Italiano di Esperanto.

**Neubrandenburg** – L'81° Congresso degli esperantisti tedeschi qui si svolgerà dal 28 al 31 maggio. Per informaz.: Werner Pfenning – Uns

Husung 29/0705- 17034 Neubrandenburg- 81.GEKpfennig@web.de

**Jingzhou** – Questa città cinese, in provincia di Hubei, ospiterà dal 1° al 6 agosto, dopo il Congresso di Pechino, la 37a Conferenza Internazionale dell'ILEI, la lega degli insegnanti esperantisti. Informa: Atilio Orellana Rojas – Riouwstraat 172 – NL-2585 HW Den Haag.

**Pechino** – Il 12 gennaio, nella sala stampa del Consiglio di Stato, si è svolta una conferenza stampa per tutti i mezzi di informazione nazionali, presieduta dal presidente del Comitato Organizzatore Yu Tao. Il Segretario del Comitato d'Onore ha annunciato che il Congresso di Esperanto è sotto il patrocinio del presidente del Comitato del Congresso del Popolo, Wu Bangguo, ed il suo tema sarà “Uguaglianza linguistica nei rapporti internazionali”. Il ministro per l'Informazione presiederà il Comitato d'onore.

**Malbork** – In questa bella città polacca verrà organizzato dal 17 al 21 luglio prossimi il Congresso Internazionale di Esperanto-Turismo. Il tema principale è la riorganizzazione dell'attività turistica supportata dalla lingua internazionale.

**Stoccolma** – Lo scrittore esperantista William Auld, scozzese, è di nuovo uno dei tanti candidati al Premio Nobel, presentato dalle associazioni degli scrittori EVA ed Esperanto-PEN.

**Sopron** – Questa graziosa cittadina ungherese, vicina all'Austria, sarà la sede del 56° Congresso internazionale dei ferrovieri esperantisti dall'8 al 15 maggio prossimo. Previste conferenze e varie attività. Per informazioni: [www.ifef.net](http://www.ifef.net) [jfk56@freemail.hu](mailto:jfk56@freemail.hu)